Vinnovka

La bosko Vinnovskaja estas unu el la plej grandaj naturaj arbaraj kompleksoj de urbo Uljanovsk. La bosko havas maljunegajn kverkojn kaj famas per siaj akvofontoj. Pli frue la bosko nomiĝis Kindjakovskaja, ĉar ĝi apartenis al bienuloj Kindjakovoj.

La 18-an de junio 1912 ĉe suda periferio de estinta vilaĝo Vinnovka (sur la loko, kie pli frue staris domo de Kindjakovoj) honore al jarcenta jubileo de Ivan Aleksandroviĉ Gonĉarov, oni konstruis kaj solene malfermis memorlaŭbon. Ĝi memorigas pri vizitado (loĝado) de la verkisto en la jaro 1849 en la bieno de Kindjakovoj, kie ĉe Gonĉarov aperis ideo de romano “Obriv” (“Deklivo”).

La monumento estis projektita de arkitekto Avgust Avgustoviĉ Ŝode laŭ mendo de bienulino E.M.Persi-Frenĉ.

Ŝi estis la lasta el la gento Kindjakovoj.

Sub laŭba kupolo staras kvaredra obelisko kun bronza bareliefo de I.A.Gonĉarov kaj memortabulo. En la jaro 1967 pro terdeglito oni transportis la laŭbon sur monteton pli norde ol Vinnovka, ĉar la fama krutaĵo, glorigita de Gonĉarov, dum la tempo transformiĝis al profunda ravino kaj proksimiĝis al la laŭbo. Fakte la frua figurbrika monumento estis rekonstruita el betono. Ĉiujare la 18-an de junio oni aranĝas tie feston, dediĉitan al I.A.Gonĉarov. Ekde la jaro 1990 tiu festo ricevis tutrusian statuson. La 17-an de oktobro 2008 la laŭbo estis plene detruita.

La 30-an de aprilo 2009 sur tiu loko restaŭrita laŭbo estis solene reinaŭgurita.

Vinnovka estas bela ĉiusezone. La urbanoj ŝatas promeni tie ne nur printempe, kiam aperas la unuaj floroj, kaj somere.

Ankaŭ vintre ili skias aŭ ĝuas frostan aeron.

Tamen precipe bele aspektas la bosko aŭtune. Rigardu mem!

Niaj E-klubanoj volonte promenas ĉi tie post kunveno en klubejo. Aliĝu!

Aŭtoroj: Sergej Abramov (teksto),
Ajgulj Vildanova kaj
Olga Terentjeva (fotoj)

I

Vinnovka

Urba
Esperanto-klubo
100 jaroj